HIMNO AL LA SONORILO DE LA MILITMORTINTOJ.

Sonoril',sonu !
Tra valoj profundaj,
Tra montoj abruptaj,
Tra blankegaj pintoj,
Tra l'faloj de bruantaj fontoj,
Tra densaj teruraj arbaroj;
Tie,kie iu lampo brilegas
Aù nigras iu kruco solece,
Tie,kie mortint' vin atendas,
Ho iru vi,voĉo fatal'.

Sinjoro de la gentoj,
Kiu kvietigas l'ondojn
Kaj l'astrojn renovigas,
Pro l'homaj preĝadoj,
De l' vespero ĝis l'aùroro,
Nin ĉiujn igu gefratoj,
De maro ,ĝis al mar'!

Sonoril' sonu!
Kaj iras via voĉo,sonoril',
El ploraj sopiroj teksita,
Perdiĝas...revenas...foriĝas...
Tra vastaj stelklaraj safiroj,
Kaj iras,senlima kareso,
Kaj iras kiel ondo el ploroj
Tra l' brizo vespere malpeza,
Kiu pasas tra steloj kaj floroj.

Sinjoro de la gentoj,
Kiu kvietigas l' ondojn
Kaj l'astrojn renovigas,
Pro l'homaj preĝadoj,
De l' vespero ĝis l'aùroro,
Nin ĉiujn igu gefratoj,
De maro,ĝis al mar'!

Autore : don Antonio Rossaro
Traduttore: prof.Laura Nones.